nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2022

## SABATA RENKONTO, KUN UEA-GASTO

La unuasabata rendevuo de la monato junio okazos la 4an de junio je la 18,30 horo, denove en la polpejo Pulpería O Miño, str. Esperanto, 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). Ni atendas la ĉeeston de Orlando Raola, estrarano de UEA, nuntempe vizitanta Madridon.

Memoru ke la renkonto estas malferma al ĉiu ajn kaj la babilado estas tute libera.

## MADRIDANOJ EN LA KONGRESO DE COMILLAS

Sufiĉe multnombra estis la partopreno de madridanoj en la 80a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis inter la 29a de aprilo kaj 3a de majo en la urbo Comillas, en Kantabrio. Se vi ne povis akompani nin, vi povas legi raporton pri la programeroj en artikolo en La Ondo de Esperanto ĉe https://sezonoj.ru/2022/05/hispanio-10/, aŭ pli detale en propra vikipedia artikolo. Oni ankaŭ filmis grandan parton de la kongreso, kaj iom post iom la videoj estas publikigataj en la jutuba kanalo de HEF, www.youtube.com/esesperanto, en speciala videlisto, kie jam troviĝas kelkaj prelegoj, kantoj, kabaredskeĉoj kaj kantabraj eroj.



La venonta kongreso okazos post unu jaro en Sevilo.

## FUENLABRADA ESPERANTO-LIGO EN LOKA FOIRO DE ASOCIOJ

La grupo "Participación Ciudadana" (Civitana Partopreno) de la urbestraro de Fuenlabrada, Madrid, iniciate de la magistratano por la edukado kaj vicurbestro, Isidoro Ortega López, mem esperantisto, invitis la asocion Fuenlabrada Esperanto-Ligo partopreni la unuan prezenton de la "interasocia" evento, kiu okazis la 21an de majo. Reprezentantoj de pli ol 80 asocioj kunvenis dum tago vestita de festa etoso, plen-plena da aranĝoj celantaj precipe familiojn: kablo-veturilo pli ol 150 metrojn longa, pajacoj, muzikistoj. La Parko de la Solidareco iĝis la kadro kiu enhavis multegajn kioskojn kie la diversaj asocioj de la urbo povis sin videbligi antaŭ la amaso da vizitantoj, jam alproksimiĝantaj ekde la fruaj matenaj horoj en la sabato. Niaj samideanoj okupis kioskon similan al tiuj de la ceteraj, kaj same ol tiuj ĉi, havis la ŝancon saluti kaj informi kaj plenkreskulojn kaj infanojn; kaj normalajn civitanojn kaj kelkajn magistratanojn kaj foir-organizantojn. La simpla kiosko kovriĝis per esperantaj flagoj sub kiuj ne malpli ol 30 eldonaĵoj diverstipaj anoncis al la interesiĝantoj ke Esperanto vivas kaj utilas.



Oni solene transdonis simplan donacon al F.E.L. memore de ĝia partoprenado en la foiro.

Ni esperas ke la sekvajn jarojn esperantistoj estos denove invititaj al tiu ĉi elmontrejo ĉe la suda parto de la Madrida Komunumo.

## LEGOKLUBO KAJ ALIAJ AKTIVAĴOJ DE FEL

La 26an de majo okazis la dua sesio de la Legoklubo de Fuenlabrada (FEL). La invitito estis Jorge Camacho, kiu prezentis kaj komentis du siajn verkojn: la rakonton *Neniam plu (Aboco de Amo)*, kaj sian poemon *Miraklo*. Li ankaŭ komentis diversajn aspektojn de sia verkado.

Jorge nutris nian menson kaj spiriton per la komento de siaj tekstoj kaj invitis nin longe debati pri liaj verkoj, kio estigis agrablan kaj lingve altnivelan etoson. Sen neceso de bis-bisumo li volonte deklamis aliajn juvelojn liajn, antaŭ longe publikigitajn. Ankoraŭfoje, lia genia verko kaj persona kvalito kuraĝigis al pli ol unu el ĉeestantoj alproksimiĝi al tiu iom timiga areo nomiĝanta poezio.

La renkonto kun la legantoj estis filmita, kaj baldaŭ aperos en la reto.

Ni invitas vin ĉiujn partopreni la sekvan Legoklubon, pri kiu ni informos per la kutimaj kanaloj. Dume ni atentigas ke la planoj de la grupo ne finiĝas tie:

1- La programo nuna de Fuenlabrada Esperanto Ligo estas...
- Ĉiusemajne kursoj baza kaj progresiga, inter la 17:00 kaj la 19:00 horoj, ĵaŭdojn.
- Ĉiusemajne: tuj post la kursoj oni surtabligas diversajn ludojn por praktiki nian lingvon.
- Ĉiumonate, la Legoklubo, gvidata de Laura Higuera, plu kunsidas por komenti E-tekstojn.

2- La programo planata estas...
- Kunkanti en Esperanto helpate de projekciaĵo kun Esperantaj tekstigitaj kantoj.
- Videokonferenci por kontakti aliajn E-klubojn.
- Deklami prozaĵojn kaj poemojn.
- Prelegi pri diversaj temoj

Por tiuj ĉi nunaj kaj estontaj aktivaĵoj ies ajn helpo estos ja bonvena!

## MIGUEL FERNÁNDEZ TURNEAS, EN OPORTO KAJ GRANADO

La 18an de majo nia samurbano Miguel Fernández vizitis la portugalan urbon Oporto, por partopreni la prezentadon de la traduko al la portugala lingvo de lia lasta poemaro, kun la titolo "Semente de alvoradas". La ĉefa aktivaĵo okazis en la sidejo de UNICEPE, la kooperativo de universitataj studentoj kiu publikigis la libron.




La venontan 2an de junio Miguel vizitos sian naskiĝurbon Granado, invitate de laikisma organizaĵo Andalucía Laica, por prezenti siajn poemojn, en evento nomita "Laikismo, internaciismo kaj poezio". La evento okazos je la 19 horo en la Granda Salono de la Facultato de Sciencoj de la Universitato de Granado.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com